# Eŭropa Esperanto-Unio

*Por efika kaj maldiskriminacia komunikado*





## Invito al la kongreso

EEU plezure invitas vin al la 9-a kongreso de EEU kiu okazos en Galivo (Gaillimh/Galway), Irlando, inter la 16-a kaj la 20-a de julio 2012. Kongresejo estos hotelo Ardilaun en Galivo, la pitoreska ĉefurbo de la okcidenta parto de Irlando, kun 70,000 enloĝantoj, situanta ĉe Atlantika Marbordo.

Kongresa ĉeftemo estos "Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli" kun emfazo pri lernfaciligaj ecoj de Esperanto por lernado de aliaj ligvoj. Tio aparte gravas post kiam junie 2011 la Platformo por Multlingveco de la EU-Komisiono, konsistanta el 29 tuteŭropaj organizaĵoj, en sia raporto akceptis la rekomendon ke “endas esplori kiu dua lingvo pli verŝajne instigas lernadon de tria kaj pliaj lingvoj”. Tiu raporto povos malfermi gravan pordon al Esperanto, se ni scipovos efike uzi ĝin.

Kongresoj de EEU okazas ĉiun duan aŭ trian jaron kaj estas bona okazo por Eŭropaj esperantistoj interŝanĝi ideojn por esperanta agado en EU. Dum la kongreso tial estas antaŭviditaj prelegoj de gravaj lingvaj fakuloj, laborejoj kaj diskutejoj. Kompreneble atendas vin ankaŭ riĉa kulturprogramo kaj turismaĵoj. Venu kaj kontribuu, ĝuu kaj lernu!

Seán Ó Riain, prezidanto de EEU



## Bonvenon en Galivo

**Galivo (Gaillimh/Galway)** estas urbo situanta en okcidenta Irlando. Ĝi estas la 5-a plej granda, sed plej rapide kreskanta urbo en la lando. Situanta ĉe la pitoreska okcidenta marbordo de Irlando, inter la lago Corrib kaj la Galiva golfo, tra la urbo fluas rivero Corrib. Galivo estas konata kiel *kultura koro de Irlando* kaj fama pro belegaj pejzaĝoj, vigleco kaj pluraj festivaloj, festoj kaj eventoj. Inter pluraj belegaj placoj de la urbo, speciale famaj estas la Eyre placo kun ĝia JFK parko kaj la Hispana Promenejo.





En la urbo vivas preskaŭ 7000 denaskaj parolantoj de la irlanda, do ĉirkaŭ 10% de la loĝantaro. Galivo inter ĉiuj irlandaj urboj havas la reputacion esti ligata al la irlanda lingvo, muziko, kant- kaj danctradicioj pro kio oni ankaŭ nomas ĝin la 'dulingva ĉefurbo de Irlando'. Ĉefe pro lokiĝo ĉe la sojlo de la plej granda Gaeltacht, la urbo estas fama pro sia “irlandeco”. An Ghaeltacht estas regionoj oficiale agnoskataj kiel ĉefe irlandlingvaj. La vorto ankaŭ signifas irlandparolantaro. Krome en tiuj regionoj troviĝas la plej netuŝitaj kaj pitoreskaj pejzaĝoj en la tuta Irlando. Do, klaras ke Galivo estas perfekta celo por Eŭropa Esperanto-Kongreso 2012. La regiono kaj la lando antaŭĝojas bonvenigi vin!



## Mapo de Irlando






## Mapo de Galivo



# Antaŭkongreso kaj postkongreso

***Antaŭkongreso - Dublino kaj regiono Wicklow***



Ĉiu kiu ankoraŭ neniam estis en Dublino devus partopreni tiun ĉi tritagan antaŭkongreson. Alveninte al Dublina flughaveno vi estos aŭtobuse veturigataj viziti plurajn atrakciojn de Dublino kaj la ĉirkaŭaĵo. Vi mem spertos vizitindecon de lokoj kiel Trinity College, Katedralo de Sankta Patriko, Katedralo de Kristo kaj la mondfama Guinness deponejo. Vi ekkonos belegajn irlandajn pezaĝojn en Wicklow kaj Dublina Montaro kaj finos la vojaĝon vizitante kaj provtrinkante en Locke's viskidestilejo.



***Postkongreso — Aran Insuloj***



Tiu ĉi dutaga vojaĝeto kondukos vin al Inis Mór, la plej granda inter la Aran insuloj, vidalvide al la Galiva marbordo. Post mallonga pramveturo al la insulo, aŭtobuse vi vizitos plurajn historiajn vidindaĵojn, kiel ekzemple Dun Aengus fortikaĵon, kiu estas majesta ŝtonfortikaĵo situanta sur la plej alta pinto de sudmarbordaj klifoj (alteco de ĉirkau 100 metroj). De ĝi sterniĝas nebarita panoramo de 120 km laŭ Irlanda Okcidenta Marbordo. Novaj arkeologiaj esploroj trovis tie pruvojn pri homaj aktivecoj antaŭ pli ol 2500 jaroj. Neniu vizito al Aran Insuloj estus kompleta sen tradicia irlanda sesio en loka trinkejo kun irlanda muziko, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.




## Kongreskotizoj

**Kategorio A**
Malnovaj EU-landoj: membroj de EU antaŭ 2004, Svislando, Norvegio, Islando

| Aliĝo ĝis | Prezo |
|---|---|
| la 30-a de septembro 2011 | 80 € |
| la 31-a de decembro 2011 | 95 € |
| la 31-a de marto 2012 | 120 € |
| post la 31-a de marto 2012 | 140 € |

**Kategorio B**
Ĉiuj aliaj landoj kaj gejunuloj ĝis 25-jaraĝaj

| Aliĝo ĝis | Prezo |
|---|---|
| la 30-a de septembro 2011 | 60 € |
| la 31-a de decembro 2011 | 70 € |
| la 31-a de marto 2012 | 90 € |
| post la 31-a de marto 2012 | 110 € |



POR PLIAJ INFORMOJ, LOĜEBLECOJ KAJ POR ALIĜI VIZITU RETPAĜON DE EEU:

**WWW.EUROPO.EU**

# 9-A KONGRESO DE EEU - 2012



## 9-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio

(kunlabore kun Esperanto-Irlando)

**16–20 julio 2012**

*"Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli"*

**Pli da informoj:**
**www.europo.eu**

**GALIVO / GAILLIMH / GALWAY**
**IRLANDO**